**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**

# Invitilo de la 83-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 2027

Proponata urbo, lando:

Proponataj datoj:

Invitanta organizo:

Sendu al **kongresoj@tejo.org** ĝis vendredo, la 16-a de januaro 2026

# Antaŭparolo

Bonvolu sendi ĉi tiun invitilon en formatoj DOCX kaj PDF ĝis la 16-a de januaro 2026 (vendredo). Kun ĉi tiu invitilo, necesas aldonaj dokumentoj:

- informiloj pri la proponata urbo;
- broŝuroj kaj mapo(j) de la proponata kongresejo;
- fotoj kaj filmetoj de la diversaj salonoj, instalaĵoj kaj aliaj servoj proponataj;
- regularoj de la proponata kongresejo, kaj se eblas, informo pri ĝisnuna korespondado kun tiu loko.

Estas bonvenaj ankaŭ lumbildaroj aŭ broŝuroj pri la organizo invitanta.

Se vi proponas pli ol unu lokon/urbon, bonvolu krei kaj plenigi malsaman kopion de ĉi tiu dokumento por ĉiu proponata loko por eviti konfuzon.

Ni kuraĝigas, ke vi anoncu vian intereson al TEJO kiel eble plej frue, prefere ne atendante ĝis la fino de la Unua Fazo. Tiel, TEJO povas helpi kaj gvidi vin en la preparado de taŭga kaj kompleta kandidatiĝo ĝis la limdato.

Ofte ne eblas plenigi la tuton de ĉi tiu dokumento, kaj se tio aplikiĝas al via kazo, tio ne signifas ke vi ne rajtas sendi vian kandidatiĝon. Sendu ĉiukaze tion, kion vi havas ĝis la limdato, kaj ni daŭrigos la esploradon se via invito estas elektita por pluiri al la Dua Fazo.

## Loko (urbo, lando)

## Datoj

## Invitanta(j) organizo(j) aŭ individuaj membroj

## Parto I. Invitanto

Se estas pli ol unu invitanta organizo, bonvolu kopii ĉi tiun sekcion kaj plenigi ĝin por ĉiu kuninvitanta organizo aparte. Almenaŭ unu el la kuninvitantaj organizoj devas esti registrita (t.e. havi juran personecon por subskribi kontraktojn).

### A. Datumoj de la organizo/grupo

| | | | |
|---|---|---|---|
| Nomo | | | |
| Adreso (strato, numero) | | | |
| Poŝtkodo | | Urbo | |
| Regiono | | Ŝtato | |
| Retpoŝto | | Retpaĝo | |
| Telefono | | UEA-kodo | |

### B. Prezidanto (aŭ ĉefa funkciulo) de la organizo

| | | | |
|---|---|---|---|
| Persona nomo | | Familia nomo | |
| Retpoŝto | | Telefono | |
| Loĝlando & Loĝurbo | | | |

### C. Respondeculo pri IJK (kontaktpersono, se alia ol ĉefa funkciulo)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Persona nomo | | Familia nomo | |
| Retpoŝto | | Telefono | |
| Posteno | | | |

| D. Statuso de la organizo | | | |
|---|---|---|---|
| Jura statuso | ☐ Sendepende jure registrita organizo | ☐ Organizo registrita pere de alia tegmenta organizo | ☐ Neregistrita organizo / neformala grupo |
| Movada statuso | ☐ Landa/faka sekcio de TEJO | ☐ Landa asocio de UEA | ☐ Alia / ne asociiĝinta |
| Nivelo de agado | ☐ Loka / regiona | ☐ Landa | ☐ Internacia |

| E. Informo pri la organizo |
|---|
| Bonvolu mallonge priskribi vian organizon/grupon (kutima agado, plej gravaj projektoj, eble organizataj aranĝoj). |
| |

| F. Motivoj pri organizado de IJK 2027 |
|---|
| Rakontu kial vi decidis inviti IJK-n 2027. En tio, detale indiku:<br>• kiel kongresanoj povas profiti vizitante vian landon;<br>• kiel la kongreso povus pozitive efiki sur la Esperanto-movado en via lando/mondoparto; kaj<br>• aliajn motivojn. |
| |

## Parto II. Loko kaj tempo de la kongreso

Kutime IJK daŭras semajnon (t.e. alventago, 6 plenaj tagoj, forirtago, 7 noktoj inter tiuj) kaj okazas tuj antaŭ aŭ tuj post la Universala Kongreso. Depende de la distanco eble unu tago inter ili estas inda. (Noto: Je la momento, la kongresurbo de UK 2027 ankoraŭ ne estas anoncita.)

### A. Situo de la kongreso

| | | | |
|---|---|---|---|
| Urbo | | Lando | |
| Ekde | 20jj-mm-tt | Ĝis | 20jj-mm-tt |

### B. Priskribo de la loko

Bonvolu mallonge priskribi proponatan kongresan urbon (ĝian grandecon, etoson, vizitindaĵojn, E-movadon en la urbo ktp.)

### C. Motivoj por elekti la lokon

Bonvolu mallonge priskribi kial ĝuste tiu loko estis elektita por la kongreso.

## Parto III. Ejoj

### A. Ĝeneralaj informoj

Bonvolu ĝenerale priskribi ejojn de la kongreso (ĉu estas unu konstruaĵo aŭ pluraj; se pluraj, kiaj estas distancoj inter ili; kiel la tuto estas situita en la urbo; kiel eblas atingi ĝin). Bonvenas ankaŭ ligilo(j) al fotoj de la ejoj (prefere fotoj kun priskriboj).

### B. Kongresejo

Bonvolu priskribi lokon, kie okazu la programo de la kongreso. Ĝi devas konsisti el ĉirkaŭ 10 salonoj por diversaj programeroj. TEJO bezonas konstante haveblan kunsidejon por Komitato kaj aliaj TEJO-programeroj. Krom tio ideale TEJO havu iun malgrandan ĉambron ŝloseblan kiu servas kiel oficejo kaj kunsidejo por la Kongresa Komisiono loko kaj kie eblas sekure deponi materialojn. Ĉambroj (taŭgaj prelegejoj) troviĝu laŭeble proksime de la loĝejo. Indas havi unu grandan salonon por la vespera programo, kiu havas lokon por ĉiuj partoprenantoj.

| C. Loĝejoj |
| --- |
| Bonvolu priskribi antaŭvidatajn eblojn kaj kondiĉojn loĝi kaj manĝi. Loĝejoj donu al partoprenantoj eblon elekti inter ĉambroj, amasloĝejo kaj tendumejo (ne nepras kaj amasloĝejo kaj tendumejo, sed nepras unu el la du – krome necesas adekvataj lokoj por amasloĝantoj kaj/aŭ tendumantoj, do duŝoj, necesejoj kaj kuirejo/manĝejo). |
| |

## Parto IV. Kostoj

Bonvolu laŭeble plej detale informi pri ĉiuj eblaj kostoj de la ejoj. Ĉi-suba modelo celas listigi laŭeble multajn eblojn loĝi, manĝi kaj kongresi, sed certe ne taŭgas por ĉiuj cirkonstancoj. Do bonvolu konformigi ĝin al viaj kondiĉoj (ekz. forigi/aldoni/ŝanĝi liniojn se bezonatas). En komentoj bonvolu indiki, kiuj prezoj povas ŝanĝiĝi kaj nun estas proksimumaj. Atentu, ke temas pri prezoj, kiujn la ejo proponas al ni (organizantoj) kaj ne pri prezoj, kiujn ni proponos al partoprenantoj.

### A. Loka valuto

Se en via lando oni uzas alian valuton ol eŭroj, bonvolu enskribi ĝian nomon, kodon kaj kurzon al EUR, kiun vi uzis por kalkulado. Kurzon oni povas trovi ekzemple en paĝaro de Centra Eŭropa Banko:
http://www.ecb.int/stats/exchange/eurofxref/html/index.en.html

| | | | |
|---|---|---|---|
| Nomo kaj kodo de la valuto: | | Kalkulata kurzo: | |

### B. Loĝado

Bonvolu enskribi prezojn por unu persono dum unu nokto aŭ skribi komenton, se estas alie.

| Kio? | Prezo EUR | Kiom da haveblas? | Komentoj |
|---|---|---|---|
| Unupersona ĉambro | | | |
| Lito en 2-persona ĉambro | | | |
| Lito en plurpersona ĉambro (aldonu liniojn se estas malsamaj tipoj) | | | |
| Aldona lito | | | |
| Loko en amasloĝejo | | | |
| Tendo | | | Por persono/por tendo |
| (alia eblo?) | | | |
| **Ligilo al la fotoj kaj videoj de loĝebloj:** | | | |

| C. Manĝado | | | |
|---|---|---|---|
| Bonvolu enskribi antaŭvidatajn prezojn de maĝoj (prezo de unu manĝo). En kolumno "Kiom samtempe?" bonvolu enskribi kiom da homoj povas samtempe manĝi. | | | |
| **Kio?** | **Prezo EUR** | **Kiom samtempe?** | **Komentoj** |
| Matenmanĝo | | | |
| Tagmanĝo | | | |
| Vespermanĝo | | | |
| Kafopaŭzo | | | |
| **Specialaj dietaj bezonoj**<br>Ĉu la loko povas adaptiĝi al dietaj bezonoj kaj preferoj de kongresanoj? | ☐ Jes<br>☐ Ne | | |
| **Ligilo al la fotoj kaj videoj de manĝejo kaj menuoj:** | | | |

| D. Kongresejo | | | |
|---|---|---|---|
| Estas diversaj manieroj pagi por kongresaj salonoj. Foje, oni pagas tutan kongresejon por la semajno, foje oni luas salonojn po horo aŭ tago, foje (ekzemple se salonoj havas saman posedanton kiel loĝĉambroj) oni eĉ pagas nenion. Do bonvolu enskribi laŭ viaj kondiĉoj. Indiku "0" aŭ "NA" se al la salonoj ne aplikeblas apartaj kostoj. | | | |
| **Tipo kaj nomo de salono** | **Prezo EUR** | **Kiom da haveblas?** | **Komentoj** |
| (ekz. klasoĉambro) | | | Hore/tage/semajne |
| (ekz. sporta salono) | | | Hore/tage/semajne |
| (ekz. trinkejo) | | | Hore/tage/semajne |
| (ekz. konferencejo) | | | Hore/tage/semajne |
| (...) | | | Hore/tage/semajne |
| **Ligilo al la fotoj kaj videoj de salonoj:** | | | |

| E. Ceteraj kostoj |
| --- |
| Ĉi tie bonvolu priskribi ĉiujn ceterajn kostojn, ne antaŭviditajn en la tabelo. Tio povas esti ekzemple iuj turistaj impostoj, garantimono ktp |
| |

## Parto V. Kongresa Komisiono

Tio estas rekomendata strukturo de la Kongresa Komisiono, tamen kompreneble eblas ŝanĝi ĝin por konformigi al lokaj kondiĉoj. Evidente povas esti ke plurajn respondecojn sur si prenas unu homo, sed prefere ne tro ĉar tiam tiu homo dronos en taskoj.

| Funkcio | Nomo | Lando | Aĝo |
|---|---|---|---|
| Prezidanto: | | | |
| Superrigardo: | **TEJO-Estrarano pri Kongresoj** | | |
| • Financa planado: | **TEJO** kaj kasisto | | |
| o Kasisto: | | | |
| • Taga Programo: | | | |
| • Tema programo: | | | |
| • Novula Programo: | | | |
| • Vespera programo: | | | |
| • Nokta programo: | | | |
| • Trinkejo: | | | |
| • Gufujo: | | | |
| • Diskejo: | | | |
| • Ekskursoj: | | | |
| • Karavanoj: | | | |
| • Teknikaĵoj: | | | |
| • Informado: | | | |
| • Kunordigo de Helpantoj: | | | |
| • Invitleteroj: | | | |
| • Aliĝoj kaj Akceptado: | | | |
| • Publikaj rilatoj: | | | |

## Parto VI. Sekureco

Ekde novembro 2023 la Komitato de TEJO devigas, ke ĉiuj proponoj por okazigi IJK-n enhavu almenaŭ bazajn planojn pri sekureco kaj preventado de ĝenado en la kongreso. Kutime dum IJK estas Konfidencpersonoj, kiuj traktas plendojn kaj raportojn pri ĝenado kaj konfliktoj, sed vi kiel proponantoj estas ankaŭ bonvenaj detaligi kiuj paŝoj ekzistas aŭ povas esti iniciatitaj ĉi-rilate. Ekzemple, se en la kongresejo estas gardistoj, proksima policejo, ktp., indas tion indiki ĉi tie.

| **Detaloj pri sekureco kaj preventado de ĝenado** |
|---|
| |

## Parto VII. Invito

Se vi havas iujn demandojn rilatajn al tiu ĉi invitilo aŭ al organizado de IJK ĝenerale, bonvolu kontakti la Kongresan Oficiston de TEJO ĉe kongresoj@tejo.org.

| Invito de la kongreso | | | |
|---|---|---|---|
| La ĉi-sube listigita(j) persono(j) konfirmas, nome de sia(j) organizo(j) la volon organizi IJK-n laŭ kondiĉoj prezentitaj en la invitilo. | | | |
| Persona nomo | | Familia nomo | |
| Loko | | Dato | |
| Organizo | | | |
| Persona nomo | | Familia nomo | |
| Loko | | Dato | |
| Organizo | | | |
| Persona nomo | | Familia nomo | |
| Loko | | Dato | |
| Organizo | | | |